# *Asertas Maduro ke Usono transdonas monon seksvestritan de Venezuelo al opoziciaj mafioj*



**Nicolás Maduro, prezidento de Venezuelo**

Karakaso, apr 26 (RHK) La prezidento de Venezuelo, Nicolás Maduro, kadre de la bilanco de la registaro kontra? Kovim-19, denuncis ke la mono frizigita kaj sekvestrita de sia lando en la bankoj tra la mondo kaj la ?tatrezervo de Usono, estas nun transdonataj al "mafioj" de la opozicianta dekstrularo.

La venezuela ?tatestro sciigis ke anonima informfonto asertis ke "oni transdonos pli ol 150 milionojn da dolaroj de la mono de la venezuelanoj" al la fortoj de la opozicio en tiu latinamerika lando.

La? asertis Maduro, tiu mono estos uzata por financi la politikan, psikologian kaj amaskomunikan militon kontra? Venezuelo. Li anka? parolis pri denunco farita de sia registaro klariganta ke la eventoj kreitaj de la opozicio en la sociaj retoj ricevas tiun monon.

"Jen la enketoj. Pli ol 85% de la venezuelanoj rifuzas tiun gvidon mafian de Guaidó", deklaris la ?tatestro, aludante la subtenon de la opoziciuloj en la teritorio.

Fonto: Telesur

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/255295-asertas-maduro-ke-usono-transdonas-monon-seksvestritan-de-venezuelo-al-opoziciaj-mafioj

Radio Habana Cuba